

BULTENO

GERMANA
ESPERANTA
FERVOJISTA
ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung
deutscher Eisenbahner-Esperantisten



Fondita 1952

Numero 5

Septembro/Oktobro 1969



La urba domo de Augsburg
kun la monaĥinejo „Maria Stern“

Aŭgsburg, gasturbo de nia 13-a jarkunveno.

Jam preskaŭ dumil jaroj oni vojaĝas al Aŭgsburg!

La roma imperiestro Aŭgustus fondis tiun ĉi urbon inter la riveroj Lech kaj Wertach 15 jarojn antaŭ la naskiĝo de Kristo kaj donis al ĝi la nomon: Aŭgusta Vin-delicorum.

En la 16a jarcento Augsburg jam havis pli ol 50 000 enloĝantojn. Apud Köln kaj Trier ĝi estis la tria plej antikva urbo de Germanujo. La plej brila tempo de Aŭgsburg, dum kiu ĝia beleco estis mondkonata, fariĝis per la florado de la tiama arto. — La granda arta estinteco donis al la urbo ĝian karakteron, kaj por artistoj kaj artamantoj estas hodiaŭ la ĉefa allogaĵo de Augsburg, la kunestado de antikvaĵoj kaj modernaj. La diverseco de la historiaj memoraĵoj kaj monumentoj kontraste al la moderna vivo prezentas al la atentema rigardanto tute unikan ĉarmon.

Meze en la urbo ekzistas ankoraŭ urbeto, nome la „Fuggerei“, ĉirkaŭita de propra muro. En ĝi loĝas malriĉaj aŭ invalidaj

aŭgsburganoj. Tiun ĉi loĝejaron, kiu estas la unua sociala loĝkolonio de la mondo, fondis Jakob Fugger la riĉulo en la jaro 1512.

La vizitanto povas admiri multajn fontanojn sur la diversaj placoj, kaj artistoj volonte uzas ilin kiel modelojn por la skiz-libreto. Ampleksaj arbaroj, kiuj ĉirkaŭas la urbon, invitas al promenoj kaj ripozo. Inter la fame konataj civitanoj de Augsburg troviĝas i. a. ankaŭ Bert Brecht kaj Rudolf Diesel.

Aŭgsburg, la perlo de la renesanco, kiu situas favore inter nordo kaj sudo, estas alloga celo ĉiujare por miloj da turistoj el la tuta mondo. Gemeliĝ-kontraktoj kun pluraj urboj en Francio, Japanujo, Skotlando kaj Usono, atestas la apertan spiriton de la tielnomata „Fugger-urbo“. La Esperantistoj de Augsburg flegas vigran kontakton kun la samideanoj el la ĝemeliĝintaj urboj.

Do venu, — rigardu, — kaj ĝuu la belecon kaj etoson de la ŝvaba metropolo Augsburg !!!

Provizora programo de la 13-a GEFA-jarkunveno en Augsburg 17. - 19, de oktobro 1969

Akcepto, kunsidoj kaj matineo en la sindikata domo de DGB Augsburg, Schätzerstraße 13;

Festvespero en la „Moritzsalonego“, Moritzplatz

17a de oktobro

10.00 Gazetara konferenco
19.00 Kunveno de GEFA-estraro

18a de oktobro

8.00 Akceptejo malfermata

9.30 Unua gvidado tra la urbo

12.30 Tagmanĝo laŭ la karto

14.00 Laborkunsido de la GEFA-estraro kaj

distriktkomisiitoj (nepublika)

14.00 Lingva ekzameno, skriba parto (nepublika)

14.30 Dua gvidado tra la urbo

18.00 Komuna vespermanĝo

19.45 Salutvespero kun varia programo, poste dancado

19a de oktobro

9.30 Matineo:

1. Arcmuziko, kantistaj kaj folkloraj prezentoj,

2. Filmprezentado,

9.00 Lingva ekzameno, buŝa parto (publika)

12.00 Komuna tagmanĝo (kun la kongreseja restoracio oni kontraktis pri favorprezaj komunaj manĝoj. Kotizo pagenda post alveno; 3,— GM).

Niajn eksterlandajn geamikojn ni kore invitas partopreni nian semajnfinan jarkunvenon en la vizitinda sudgermana barokurbo Augsburg, konvene situanta kaj rapide atingebla. Petu aliĝilon kaj detalan programon de la sekretario: Otto Rösemann, Kokschestraße 44, D 46 Osnabrück.

Internacia Fervoja Esperanto-Skisemajno 1970

La 11a IFES okazos en la unua semajno de februaro 1970 en la montara regiono de Malgranda aŭ Granda Tatra en Slovakio.

2-4 litaj ĉambroj estas je dispono. La pluajn necesajn informojn vi ricevos per la analoga maniero. Se

vi interesiĝas je partopreno, sendu vian provizoran aliĝilon jam nun al

s.ro Ladislav Kovár

U. Kostelička ĉ. 519

Ceska Trebova/CSSR.

Zamenhof - monumento en Zwolle (Nederlando)

Kun helpo de la urba regi-

staro rajtas la zwollaj gesperantistoj lokigi monumenton. Por efektiviĝi tiun deziron bezonas la grupo monon. La komitato „Zamenhof Monument Zwolle“ havas konton: 806 331 ĉe la „Gemeente Stortingdienst te Zwolle“. Ankaŭ GEFA subvencias la laŭdindan planon.

13. Jahresversammlung in Augsburg 17. - 19. 10. 1969

Anmeldevordrucke

können beim zuständigen Bezirksbeauftragten oder beim Sekretariat angefordert werden.

Anmeldeschluß

5. Oktober 1969

Beitrag

3,— DM wird bei der Ankunft erhoben.

Empfangsschalter und Tagungsräume

Gewerkschaftshaus, Schätzerstraße 13.

Korrespondenzanschriften

1. Bezirksbeauftragter für Augsburg:

Hermann Schmid

EDS: Bww Augsburg:

Basa: 965/1318 (Frau

Schmid, Regensburg);

Post: Sebastian-Kneipp-

Str. 6, D 8901 Westheim;

Tel.: (08 21) 48 25 92

2. Sekretariat der Vereinigung:

Otto Rösemann

EDS: GV Osnabrück;

Basa 945/822/357;

Post: Kokschestraße 44,

D 46 Osnabrück.

Sprachprüfungen

Anmeldungen bitte umgehend an: BOAR Dr. Lang, Pa bei der BD Frankfurt/Main; Basa 955/1501.

Konata Esperanto-pioniro mortis

En n-ro 2/68 de „Bulteno“ mi kun ĝojo povis publikigi gratulojn je la 90a naskiĝtago de Hugo Steiner, fondinto de la internacia Esperanto-Muzeo en Wien. Hodiaŭ mi malĝoje devas nekrologi pri la tiama gratulito, kiu mortis la unuan de aŭgusto 1969 en sia 92a vivjaro GEFA telegrame kondolencis.

Ne ofte homoj havas la bonŝancon, plenumi tian sukcesplenan vivon kiel Hugo Steiner, kiun la aŭstra ŝtato nomigis „Kortega Konsilisto“ (Hofrat). Li estas eksterordinara homo, kion oni povas ekkoni jam el tio, ke li libervole forlasis la fervojan servon kaj emeritiĝis kiel ankoraŭ juna fervojisto kun ne tre alta pensio, por povi kom-

plete dediĉi sin al Esperanto. Lia preferita vivotasko fariĝis la unika muzeo en Wien, kiun li fondis en 1927. Li gvidis ĝin spite al milito, spite al minacado flanko de la hitlera polico, kiu provizore enkarcerigis lin kaj spite al ĉiuj specaj obstinaĵoj, kiuj neniam mankis. Li evoluis, kolektis, aktive laboris kaj gvidis tiom longe, kiom liaj fortoj permesis. Kaj fakte nur antaŭ malmultaj monatoj nin atingis la neĝoja komunikado, ke pro severa malsano li devis ĉesi sian amatan okupon por sia lingvo. Tio tutcerte estis unu el la plej teruraj momentoj en lia vivo.

Ĉiuj esperantistoj nur povas esti dankaj al homo, kiu tiom sindone, tiom sen-

kompromise iris sian vojon, por progresigi la lingvon, kiun granda homo kreis antaŭ pli ol 80 jaroj, homo, kun kiu Steiner persone konatiĝis en 1911 kaj kies heredajon li decidis administri. Ne mankis al li seniluziigoj — kie ili ne mankas? Sed li ankau povis konstati dum sia tuta vivo, ke li iris bonan kaj ĝustan vojon. Sennombrajn honorojn kaj distingojn li ricevis, kaj jam el tio li kaj lia mond vasta amikaro povis ekkoni, ke la vojo estis ĝusta.

Hofrat Hugo Steiner estos por ni ĉiama modelo, kiun ni klopodos imiti laŭforte. Li restos neforgesita en la koroj de saĝ multnombraj amikoj kaj de la tuta esperantistaro. J. Giessner

Distrikt-komisiito en Hamburg.

Modeste kaj diskrete prizorgas ek de 1959 Werner Lepke (56) pro peto de la BSW-estraro la distriktajn aferojn por GEFA. Laŭ siaj propraj vortoj „mi ne estas klubulo“, li ankaŭ ne ŝatas eksposti sin publike. Lia oponio pri Esperanto bazas sur faktaj sen utopiismo. 1950 Lepke lernis Esperanton ĉe August Weide en Hamburg. Kiel kunlaborinto 1952 en Lindau (4. IFEF-kongreso) li pruvis sian organizan talenton; antaŭ kelkajn jarojn li organizis en kadro de BSW-grand-



Werner Lepke

aranĝo Esperanto-ekspozicion. Komence de la kvindekaj jaroj nia kolego partoprenis Esperanto-feriosemajnon en Wien ĉe Hofrat Hugo Steiner, entute 9 IFEF-kongresojn li partoprenis kaj kunlaboris en preskaŭ ĉiuj GEFA-jarkunvenonjn. Dum sia malmulta libera tempo li korespondas kun fervojistaj amikoj en ĉiuj partoj de nia globuso; momente li gastigas tri kolegojn el Budapeŝt. Unuvorte k-go Lepke reprezentas niajn organizon kaj komunan ideon en digna maniero.

Redaktoro

Ni funebras kaj kondolas. Distrikto Essen

S-ro Wilhelm Kirschgens, gvidinto de la fervojista Esperanto-grupo Duisburg-Wedau, mortis la 21-an de junio 1969 post mallonga, grava malsano en la aĝo de 66 jaroj.

Li esperantiĝis jam dum la komenco de la dudekaj jaroj; baldaŭ post la dua mondmilito li denove iĝis membro en Esperantista rondo — nun en la grupo Duisburg-Wedau de la fervojistaj Esperantistoj. Kiel aktiva Esperantisto li ankaŭ bone kunlaboris kun

la loka grupo, kaj post la transloĝigo de nia kolego P. Hermanns al Hagen kolego Kirschgens gvidis nian fervojistan grupon en Duisburg-Wedau.

Dum liaj vojaĝoj kiel Esperantisto li konatigis kun multaj landoj, sed lia granda, sekreta amo estis Jugoslavio, kie li havis multajn amikojn. Ni esprimas nian sinceran kondolecon al lia vidvino s'ino Gertrud Kirschgens.

Distrikto Wuppertal

Kun malĝojo ni devas sciigi, ke nia longjara membro kaj samideano Anton Ballauer, Hagen (Westf.), 58 jaraĝa, mortis je la 23. 6. 1969 dum sia ferioestado en Ailingen (Bodensee). Ballauer kelkfoje gvidis kursojn en Hagen kaj Schwerte; ĉiam li estis preta solvi multflankajn problemojn en nia distrikta Esperanto-vivo. La gekolegoj de nia distrikto partoprenis la entombigon kaj metis florkronon kun Esperanto-rubando. Li ripozu en paco! GEFA

Fervojaj novaĵoj el eksterlando

Aŭstralio. 10 000 tunojn pezas unu sola el la erctrajnoj, kiuj ek de marto 1969 transportadas ferminajojn de Mount Newman en okcidenta Aŭstralio sur 500 km longa relvojo alla marbordo por enŝipigo. Kvin lokomotivoj tracias unu trajnon kies longeco povas atingi 1,7 kilometrojn! Jen dimensioj en Eŭropo ape-naŭ imageblaj.

Belgio. En la stacidoma halo de Schaerbeek oni instalas luksan akceptejon por la klientoj de la aŭtopasaĝer-trajnoj. Schaerbeek proksime de Bruselo estas la plej grava stacio de SNCB por tiu ĉi moderna kaj konstante kreskanta specialservo de la fervojoj: 25 960 pasaĝerojn kaj 9249 aŭtomobilojn oni nombris ĉi tie en 1968.

Francio. Vera sensacio fariĝis la unua provveturo de la „Aerotrain“ okazinta la 22an de januaro 1969: sur unukilometra distanco tiu eksperimenta veturilo, glitanta sur aerkusenoj,

atingis rapidecon de 411 km/h, la maksimuma rapideco estis eĉ 425 km/h! Raketo kun puŝforto de 1250 kg movigis la veturilon, dumtempe funkciis kroma raketo kun pliaj 500 kg da puŝforto. Gratulon al SNCF.

Pollando. Ankaŭ ĉi tie la elektrizado de la ĉefaj fervojlinioj esence progresas. En la jaro 1961 estis nur 1212 km sub elektra trakcio, 1963 estis 1560 km kaj 1965 jam 2227 km. Ĉe jarkomenco 1968 oni atingis 2900 km, t. e. 12,5 % de la tuta pollanda fervojreto. Sur tiu elektrizita relvojo PKP realigas 41,3 % de la pasaĝertrafiko kaj 25,3 % de la vartrafiko.

Aktiva GEFA-membro 85 jarojn aĝa

La 1an de oktobro 1969 nia longjara membro Wilhelm Bulla, 435 Recklinghausen, maljunelejo „St. Hedwig“ fariĝos 85 jaraĝa. Bulla estas la plej maljuna aktiva membro de la Germana Esperanta Fervojista Asocio, li jam esperantistiĝis en la tridekaj jaroj de tiu ĉi jarcento. Estraro kaj

la tuta asocio deziras al nia fidela membro ankoraŭ multajn jarojn en plej bona sanstato. GEFA-estraro

La dua lingvo por ĉiuj

La fakgazeto „Der Eisenbahner“ publikigas en n-ro 4/69 plurpaĝan verkon sub la titolo „Von den künstlichen Sprachen“. D-ro Lang, Frankfurt/Main, desegnis la diversflankajn klopodojn por kreado de komuna mondlingvo en tri jarmilojn. Li resumis, ke nur Dr. Zamenhof trovis la sole taŭgan vojon kun Esperanto por solvi la lingvajn malhelpaĵojn. GEFA aprezas tiun artikolon kaj dankas la aŭtoron pro lia iniciato.

INICIATO

Sub tiu ĉi nomo GEA eldonas plej aktualajn informojn, sciindaĵojn kaj instigojn el la germana Esperanto-movado. INICIATO prezentas valoran materialon senpage por funkcioj kaj aktivaj kunlaborantoj. Mendu ĝin ĉe: Deutscher Esperanto-Bund, 85 Nürnberg 2, Postfach 2113.

Nova Esperanto-strato en Løten
Kiel rezulton de sukcesaj klopodoj Norvega Esperantista Ligo inaŭguris novan Esperanto-straton dum sia 41-a kongreso en la loĝloko de la IFEF - redaktoro. GEFA gratulas.

Turismo

Esperantista skiferio Adelboden/Svislando — 26. 12. 69 — 4. 1. 70. Loĝejo: simpla bela ĉaledo en la Bernaj Alpoj. Prezo: por la tuta restado sfr 150. Vojaĝo: Gis fervoja stacidomo Frutigen. Se vi deziras esti inter la 23 partoprenantoj petu programon ĉe: Kultura Centro Esperantista, Miéville 133, CH-2314 La Sagne.

Herausgeber/eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung/redakcio: Wilhelm Graß, 565 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck/preso: Fränkische Verlagsanstalt und Buchdruckerei GmbH, 8500 Nürnberg. Der Bezug ist für Mitglieder der Vereinigung deutscher Eisenbahner-Esperantisten kostenlos. La abono estas senkosta por membroj de la Germana Esperanta Fervojista Asocio.